# LIBERA TRIBUNO

**Rilate al k-doj Welser k E. S. (28.565).** Respondi ion pri la absurdaĵo de k-do Welser en n-o 564 de „S-ulo" ŝajnas al mi sensenca, ĉar ekzistas homoj, kiuj aŭ ne volas aŭ ne povas kompreni. Ni turnas nin al tiuj, akceptemaj je novaj pensoj, kiuj serĉas aliĝon al movado estonta. Homo, kiu ne povas evoluigi sian spiritan koncepton, estas por mi konservativulo, tute egale kiun vivkoncepton li defendas. Pledante por la teorio de S. Gezel (Gesell), mi ne volas aserti, ke neniam ekzistos pli bona teorio, sed ĝis nun mi ne trovis pli bonan, klaran k logikan politik-ekonomian teorion realigeblan.

Al k-do E. S. mi nur volas diri jenon: 1) en viaj asertoj rilate al Gezel estas kelkaj gravaj eraroj, pri kiuj mi ne korektos, ĉar tio estas jam dirita en miaj antaŭaj artikoloj. 2) Kiel en la sfero spirit-anima ekzistas du ĉefaj principoj, la bona k la malbona principo, same ankaŭ en la sfero de l' politik-ekonomia vivo. Du kontraŭaĵoj ekzistas ankaŭ tie: la **individuismo** = persona libero k la **komunismo** = **servuteco.** Kompreneble inter ili ekzistas ampleksa skalo, sed tio ne forigas la fakton pri ekzisto de du ĉefprincipoj. La privat-kapitalismo troviĝas proksimume en la mezo, sed pli proksimume al komunismo ol al individuismo, ĉar ĝi formas la nunan ŝtaton. La kapitalismo eluzas ĉi tiun ŝtaton pere de dekretoj k sintrudoj en la privatan sferon de la individuo. Tamen ĉi tiu ŝtato donas ankaŭ iom da libero, almenaŭ tiom, kiom estas necese por **ŝajnigi** humanecon. La komunismo estas ankaŭ nomata ŝtatkapitalismo, ĉar ĝi ne forigas la ekspluatadon de la laborantaj homoj.

La staton de l' servuteco, aŭ por mildigi la vorton, de dependeco ankaŭ ne forigas la anarkista komunismo. Laŭ mia opinio k sperto povas tute forigi la servutecon nur la individua anarkismo, al kiu similas, almenaŭ en la plej gravaj punktoj, la Gezela teorio (vidu Prudhon k Gezel). Nur unu grava diferenco ekzistas: la eblecon por jam nun realigi tiun socistaton montris al ni S i l v i o  G e z e l.

Tio ne signifas, ke ĉiu ano de Gezel estas anarkisto, ĉar la Libersocia ideo donas la eblecon, ke ĉiu homo povas vivi laŭ sia emo, volo k laŭ sia naturo, do eĉ en komunismo, se tiu homo ne ĝenas la aliajn per tiu ekonomia sistemo. Progresemaj homoj, kiuj nun volas informiĝi detale pri la Gezela teorio, turnu sin al „Liber-socia Rondo", adr. B. Hasecke, **Velbert**, Königstrasse 26, aŭ al F. Hölzgen, **Refrath** (ambaŭ en Germanio).

Kaj K-do **Welser** diras dufraze al Vilestro (28.418): „Eĉ se vi k k-do Hoelzgen k S. Gezel k ĉiuj samteorianoj k viaj vin laŭdintaj eminentaj scienculoj, kiel P. E. Anderson, naci-ekonomia profesoro en Novjorko, k prof. d-ro Irving Fiŝer (Jaleuniversitato) k P. de Kruif, nederl. verkisto k H. G. Wells k prof. d-ro Soddy, nobelpremiito de Oksfordo, k J. Maynard Kejnes (†), mondbanka direktoro, k prof. Ejnŝtejn k prof.d-ro E. Schneider, docento de Inst. Ruso, Ĝenevo, k d-ro Th. Christen, Svisio, k prof.d-ro Rissom, Hamburgo k prof. Harms, Kiel, k prof. d-ro Stillich, Humboldt-Akademio Berlino, k Ed. Daladier, k Satijabrata Raj, Hindio (kunlaboranto de Gandi) k lordo Northbourne, angla socireformisto, k Geo Maffat, Oficejo de l' Eŭropaj aferoj en Usono, k E. S. Woodward, naci-ekonomo en Brita Kolumbio, ŝanĝus ĉiuvespere ĉiujn monbiletojn k ne pagus rentumon, multaj milionoj da marĉandistoj pri militŝipoj, malnova fero, ĉifonoj, Krist-krucoj, benitaj Lurdmedaloj, publikulinoj, faruno, fromaĝo, haringoj k laborista muskola k cerba forto, ĉiusekunde, ĉiuhore, k de mateno ĝis nokto bonege manĝus, bonguste sin vestus, komforte loĝus k belege amuziĝus, ĉar tio estas la intenco, deziro, sopiro, aspiro, espero, principo, koncepto, patrio, honoro, religio, Dio, moralo, virto, senco, celo k vivo de l' marĉandisto, — dum milionoj da ekspluatatoj samtage laboregus kreante riĉaĵon, aŭ malsatus kiel senlaboruloj aŭ invalidoj, serĉante sian nutron el rubujo. Mi demandas, por kiu la ŝparado de l' Gezelanoj estas dezirata favore al nova kapitalformado."

★

**Respondo al Moko.**

Kun granda atento mi legis en la n-ro 564 de „S-ulo" aparte la artikolon „Hipokrituloj", en la Junular-angulo. Mi ne volas diskuti pri la temo mem, k estus tre bone, se la aŭtoro k eĉ la tradukinto trovas „belega", se iu ajn junulo frakasas la kapon de nekulpa maljunulo (eble eĉ oni povus dekoracii tiun heroon!). Sed kio malplaĉas al mi, estas tiu akra tono, tiu malagrabla senco en la frazoj. Vi ne volas agnoski, — cetere kiel mi mem, — ke la junularo putras, sed vi malafable atakas ĉiujn, kiuj ne opinias same kiel vi. Ĉu do vi juĝas vin PERFEKTA? Kaj ĉu tiu, kiu parolas pri tio kion li faros morgaŭ, estas certa, ke li ne estos tiel stulta kiel tiu, pri kiu li rebatis hieraŭ? Ni jam havis multe da pruvoj. Mi konfesas, ke mi forlasis kelkfoje ideojn, kiujn tamen mi opiniis bonegaj, mi agnoskis la malon, ĉar vere mi eraris post amikaj refutoj neakre k klare esprimitaj.

Mi diros ĝentile al nia amiko tradukinto Moko, ke nia devo ne estas serĉi la hipokriton de niaj juĝantoj, sed strebi por ne fariĝi tiel hipokritemaj kiel ili. Kaj ni devas multe pripensi antaŭ ol paroli!

Mi pensas, ke ekzistas en la junularo certe multe pli da honestaj homoj ol da „putrantoj", sed ŝajnas ke vi mem ne trovos multe da „neputrantoj" post via severa kribrado de la ordenposedantoj, patriotoj, kadukuloj, kristanoj, mezklasaj civitanoj ktp. En mia natura naiveco mi kredis esti la sola perfektulo sur la tero; nun mi ekscias, kun ia bedaŭro, ke du aliaj homoj, la verkinto k la tradukinto de la artikolo, pretendas ankaŭ je tiu perfekteco.

*P. Riffaud (28.188)*

## LIBERPENSULA ANGULO

**Ni vokas al prunto!**

Kiuj liberpensulaj k-doj estus pretaj prunti al SAT monon por la speciala celo de eldono de la sekvanta verketo, originale verkita de K-do B. Rijpstra, Leeuwarden:

**BIBLIO ĤAOSA?**

Ĉirkaŭ 75-paĝa. Enhavo:

1. Konsiderado: Racio, morala konscio (racia etiko) k sperto, kontraŭordona skribaĵo, tradicio, dogmo. Ĉu bona k ĉionpova dio eblas? Nia morala juĝo. Faro k motivo. Morala kriterio (etika normo). Vivanta homeco. La aŭtonoma homo. Kontraŭmorala koncepto pri dio. Scienco, materialismo, ateismo.
2. Malnova Testamento (historia rigardo).
3. Nova Testamento (historia rigardo).
4. Arbitra (trompa) interpretado en la N.T. de M.T.-aj profetaj diroj.
5. Analizo de la evangeliaj rakontoj pri Johano la Baptisto — la naskiĝo(j) de Jesuo — la Pasio, Krucumo k Resurekto.
6. Vana atendo („Jesuo" ne revenis).
7. Ĉu „Jesuo" iam vivis? (La historiistoj tiuepokaj silentas).
8. Ampleksa kolekto da bibliaj reciprokaj kontraŭdiroj ktp.
9. La absurda rakonto pri kreo de l' tero k ĉielo.
10. Amo, justeco ktp. de la biblia dio....

Se vi deziras eldonon, vi skribu al k-do B. Rijpstra, Verstolkstr. 10, Leeuwarden, Nederlando:

1. Mi deziras eldonon.
2. Mi pruntedonos por ebligi presigon: ..................

Nomo ..............................

Adreso: ..............................

## RETORIKO de I. Lapenna

Jen la konkludo de la 4-a ĉapitro el tiu libro:

*Inter la naciaj lingvoj k la Internacia Lingvo ekzistas nur unu gravega diferenco, nome diferenco de celo, al kiu ili servas: dum la naciaj lingvoj havas la taskon kontentigi la limigitajn bezonojn de pensado k de komunikado en naciaj kadroj, la Internacia Lingvo liberigas la penson de la nacilingvaj ĉenoj k flugigas ĝin libere de lando al lando, de nacio al nacio, tra la tuta mondo. Kiam oni amase, grandskale eklernos la Internacian Lingvon en ĉiuj lernejoj de la mondo, dediĉante al ĝia studo nur kvaronon de la tempo, kiun oni dediĉas al lernado de la propraj naciaj lingvoj, tiam la homaro ĝisvivos grandegan spiritan revolucion k tiam plene evidentiĝos la fruktodona k morala k intelekta efiko de la Internacia Lingvo!*

La libro estas havebla ĉe SAT - Parizo. (216 pĝ.; prezo 500 ffr. aŭ 1.42 dol. plus 10% por la afranko).

**Braziliaj SAT-anoj!** Interkonsente kun la P.K. K-do Gentil de Brito Lopes en **Santos** dissendis la cirkuleron al ĉiuj membroj, kiun dume vi ricevis. Tiu k-do akordiĝos pri jam pagitaj kotizoj kun k-do das Neves. Bonv. konsideri lin kiel novan landan peranton.